

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio, pri la vivo en svisa montara vilaĝo.

Lastan semajnon kvin gelernantoj de La Sagne sin prezentis. Ili poste diris al vi kelkajn vortojn pri la ekonomio, klimato kaj situo de sia vilaĝo. Ni redonu al ili la parolon, Jacques Maire, lastan semajnon vi antaŭsciigis, ke via vilaĝo estas eksterordinare longa.

Jacques Maire.- Jes ! Mi menciis, ke de la unua ĝis la lasta domo estas du horoj de marŝado. Nia vilaĝo estas strat-vilaĝo. Tio signifas, ke ĉe la bordo de nia vilaĝo troviĝas strato, kaj ke dum multaj kilometroj domoj dissemiĝas trankvile. Estas ĉefe farmdomoj, sed ankaŭ domoj kun multaj loĝejoj, fromaĝejoj, fabrikoj, kaj kiel en ĉiuj komunumoj, preĝejo, lernejo, komunuma domo kaj multaj kafejoj.

Alain Perrenoud.- Por ridi oni rakontas, ke sankta Nikolao dum la kristnaska nokto iris al La Chaux-de-Fonds portante sakon kun ludiloj. Sed la sako havis truon. Unuj post la aliaj domoj falis laŭ la vojo. Jen nia vilaĝo !

Françoise Junod.- Kiam oni vidas nian vilaĝon el la supro de la najbara monto, oni vere havas la impreson, ke la domoj estas ludiloj.

Jacques Robert.- Estas historia kaŭzo al la longeco de nia vilaĝo. Dum la dekkvara jarcento, kiam la unuaj pioniroj sin instalas, ili trovis vastan torfan marĉon, kiu kovris la tutan valon. Ili do nur povis profiti pri la bordo de la valo, kie la deklivo ne estas tro abrupta kaj kie ne plu estas tro marĉe.

Lise-Hélène Matile.- La kamparanoj bone laboris, ĉar hodiaŭ ne plu ekzistas torfejo en nia parto de la valo. Ili vendis tiun torfon kiel brulaĵon al la urbanoj, ĉu en La Chaux-de-Fonds, Le Locle aŭ eĉ Neuchâtel. Por tion fari ili uzis specialajn veturilojn. Tiu vendo riĉigis niajn kamparanojn dum longaj jarcentoj.

Jacques Robert.- Hodiaŭ la torfejon anstataŭas kampoj, kiuj ĉefe produktas fojnon.

Jacques Maire.- La flankoj de nia valo estas kovritaj de belaj arbaroj, kiuj estas riĉeco por nia komunumo. La suproj de la montoj formas vastajn komunumajn paŝtejojn.

Françoise Junod.- Do imagu nian valon kiel grandan ebenaĵon unukilometro-larĝan inter du sufiĉe abruptaj montaroj.

Alain Perrenoud.- Nun necesas diri kelkajn vortojn pri niaj domoj. Ni havas belegan preĝejon.

Lise-Hélène Matile.- La diseco de la domoj estis bona protekto kontraŭ incendioj. Dum en la aliaj vilaĝoj tre ofte la preĝejo suferis pri brulo, ĉe ni ĝi staras kiel antaŭ kvin jarcentoj.

Françoise Junod.- Ĝia turo, la plej malnova parto, estas romanika, kaj la navo estas belega ekzemplo de flamgotika stilo.

Jacques Maire.- Oni venas el tre malproksime por admiri nian preĝejon. Ĝi servis unue al la katolika kulto. Dum la reformacio la vilaĝanoj frakasis la vitraĵojn kaj statuojn. Do ĝi hodiaŭ tre plaĉas al la protestantoj, dum la katolikoj ĝin trovas iom nuda.

Jacques Robert.- En ĝi ne nur okazas diservoj, sed ankaŭ laikaj manifestacioj : la festo de la lernejo kaj koncertoj. Antaŭ du jaroj dum esperantista kongreso la du superaj klasoj kantis en la internacia lingvo kantaton de Cezaro Frank. Orgenisto kaj solistinoj nin akompanis.

Lise-Hélène Matile.- La lernejo situas je duonhoro de la preĝejo, apud la komunuma domo, kie troviĝas interesa muzeo kun neŭŝatela folkloro ĉambro. Dum la esperantista kongreso ni

organizis grandan ekspozicion pri Unuiĝintaj Nacioj en la gimnastikejo. Tiam ni servis supon al pli ol 150 piknikantoj.

Jacques Maire.- Proksime de la lernejo troviĝas vojkruciĝo kun belega fontano. Dum la somero ofte okazas dancvesperoj sur tiu ĉi placo aŭ sur la ludejo de la lernejo. La profito de tiuj vesperoj servas al la plibeligo de nia vilaĝo.

Jacques Robert.- La farmdomoj estas tre grandaj, ĉar sub ilia tegmento ne nur troviĝas la loĝejo de la kamparistoj, sed ankaŭ la bovinejo kaj la fojnejo.

Françoise Junod.- Nun eble necesas diri kelkajn vortojn pri la vilaĝanoj. Ni jam rakontis al vi lastsemajne pri iliaj profesioj. Ni rememorigu, ke la ĉefa industrio estas la horloĝfabrikado. Duono de la loĝantoj vivas dank'al tiu industrio. La alia duono estas kamparanoj, kiuj ĉefe okupiĝas pri bredado kaj laktoproduktado.

Lise-Hélène Matile.- Ni estas iom pli ol mil loĝantoj en nia vilaĝo. La oficiala lingvo estas la franca, sed ofte kamparanoj parolas la svisgermanan, ĉar ili alvenis el la najbara kanton Berno. Vivas ĉe ni ankaŭ multaj italoj. Koncerne la religion ni kalkulas du trionojn da protestantoj kaj unu trionon da katolikoj.

Vi aŭdis kvin geknaboj el svisa montara vilaĝo. Se vi deziras ricevi bildon de tiu vilaĝo skribu al Radio-Svislando.

Ĉiuj.- Ĝis reaŭdo !

-oOo-